# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc-Roussillon»

5, Quai Vauban - PERPIGNAN (P.-O.) - Téléfono 34-38-84

N° Speciala ---------- Jara Abono : 2 F. -------- 1a Trimonato 1969 --

C.C.P. 956 28 MONTPELLIER

°°0°°

## RENKONTO EN AVIGNON

La 16an de februaro, kunveniĝis en Avignon kelkaj esperantistoj el Montpellier, Alès, Nimes, Le Cailar kun samideanoj el Aix, Avignon Noyon, Crest.

Tagmanĝo okazis en restoracio " Le Palais de la Bière ". Postagmeze, la samideanoj kunveniĝis en lernejo en la kampara loko " Courtin sude de Avignon, kie deĵoras gesamideanoj Gente.

S-ro Lentaigne kaj S-ino Gente parolis pri pedagogia sperto de samideanoj Gente kaj klarigis la infandesegnaĵo je la muroj de la lernejĉambro.

Demandoj pri tiu pedagogia sistemo estis farita al ge-roj Lentaigne kaj Gente de kelkaj ĉeestantoj.

Poste ni gajigis per kansonetoj, kaj ni disiris kun bonhumoro pro tiu agrabla tago.

L.A.

-:-:-:-:-

## FEDERATION LANGUEDOC-ROUSSILLON

LE CONGRES FEDERAL aura lieu à PEZENAS le 23 Mars à 10 Heures Salle de la Mairie.

Ordre du jour :

Rapport moral
Rapport financier
Questions diverses.

Repas tiré du sac ou possibilité de restaurant dans la ville.
Egalement possibilité d'assister à Béziers à la projection de films organisés par la Société Esperanto de Beziers.

# FINANCA RAPORTO DE LA JARO 1968

| | | | | Deficito | Benefico |
|---|---|---|---|---|---|
| Enhavo la 1a de januaro | | 311,48 | | | 311,48 |
| Bulteno | Elspezoj | 244,35 | | | |
| | Enspezoj | 224,50 | | | |
| | | 019,85 | | 19,85 | |
| Kotizoj | Enspezoj | 3410,50 | | | |
| | Elspezoj | 3175,50 | | | |
| | | 0235,00 | | | 235,00 |
| Donacoj | Enspezoj | 23 | | | |
| | Elspezoj | 10 | | | |
| | | 13 | | | 13,00 |
| Manifestacioj | Enspezoj | 15,90 | | | 15,90 |
| Mondoj | Enspezoj | 51,00 | | | |
| | Elspezoj | 51,00 | | | |
| | | 00,00 | | | |
| Sekretario | Elspezoj | 27,50 | | 27,50 | |
| Diversaj | Enspezoj | 0,30 | | | 0,30 |
| Entute | | | | 47,35 | 575,68 |
| | | | | | - 47,35 |
| | | | Nota Benefico = | | 528,33 |

Dum majo okazos en Perpignan Franca-Hispana renkontiĝo.
Por plia informo sin turni al Sro Llech-Walter 5,quai Vauban PERPIGNAN

LA PAGE DU TRESORIER

Payez vos cotisations au trésorier de votre groupe local ( ou de votre fédération ) . Mais absolument pas à U.F.E.

Vous pouvez choisir entre ces cotisations :

1°) U.F.E.

a) - Avec la Revue Française d'Esperanto

| | | |
|---|---|---|
| Membro Titulaire = Membro-abonanto MA | ................... | 30 Frs. |
| " " Moins de 21 ans J. MA | ................... | 15 Frs. |

b) - Sans la Revue Française Esperanto

| | | |
|---|---|---|
| Membre adhérent = Simpla membro SM | ................... | 6 Frs. |

2°) U.E.A.

a) - En recevant le jarlibro de U.E.A. et la revue Espera

| | | |
|---|---|---|
| Membro-abonanto MA | ................... | 35 Frs. |
| " " Moins de 21 ans J.MA | ................... | 27 Frs |

b) - En ne recevant que le jarlibro de U.E.A.

| | | |
|---|---|---|
| Membro jarlibro MJ | ................... | 17,50 F |
| " " Moins de 21 ans J. MJ | ................... | 9 Frs. |

C.C.P. N° : 956-28 Montpellier.
Fédération d'Esperanto " Languedoc-Roussillon."

-:-:-:-:-:-

BEZIERS

La laboro komencis en Beziers ek de oktobro. Tri kursoj regule okazas : du por junuloj ( unu okazas ĵaŭde en la kunvenejo, la alia en la liceó la Dullague ) unu, vespere, por plenkreskuloj.

Pasintan someron, unu el niaj lernantinoj gajnis la restadon en Utrecht okaze de la S.A.T. kongreso. La grupo helpis ŝin por la pago de la vojaĝo ĝis Utrecht ( premio por la lernado ). Ŝi revenis tre entuziasmigita de sia vojaĝo kaj komprenoble daŭrigas sian studadon.

Nun la grupanoj vigle preparas prezentadon de diapozitivoj ( Nederlando, Skotlando) kaj filmo ( Bohemujo). La kunveno okazos la 30 an de marto je la 17a en Palais des Congrès.

Bonvenon al ĉiuj.

# KULTURA TAGO EN LEZIGNAN

La Tuluza Esperanto-Societo organizis la 10an de Novembro en Lezignan-Corbières, kulturan tagon, favore al la Esperantistoj, anoj de la federacioj Langvedoko-Rusiljono kaj Sudfrancio-Pireneo. La kunveno okazis en la domo de la Junuloj kaj de la Kulturo.

Pli ol 50 samideanoj partoprenis tiun tre agrablan kaj instruan renkontiĝon. La programo estis alloga kaj ĝi disvolviĝis perfekte, jene :

Unue Doktoro Albault prelegis pri la originoj de Esperanto. LI aldonis kelkajn vortojn pri la Esperanta literaturo kaj pri verkistoj aù poetoj kiel J.Baghi kaj Kalocsay.

Poste S-ro Lontaigne malfermis ekspozicion pri la libro Esperanto. ( Notu bone, ke tiu materialo troviĝas en kestetojn. Sufiĉas malfermi ilin, kaj la ekspozicio estas tute muntita. Estus bone se ĝi povus trairi nian regionon kaj Francio de urbo al urbo. Tio dependas de ni ĉiuj, ĉu ne ? -- La interesatoj povas sin turni al S-ro Lontaigne, 3, Avenue de la Gaillarde, Montpellier ) .

Post la komuna tagmanĝo ni ĉeestis projekcion de la filmo Angoroj de J.L. Mahé, unua filmo, tute pensita kaj realigita en Esperanto.

F-ino Vierne el Montpellier faris al ni demonstradon de Esperanto instruado, per la aùdo-vida metodo de Tibor Sekelj : ŝi partoprenigis nin al tiu studado. La multnombraj demandoj, kiun la ĉeestantoj metis al ŝi pruvis ke tiuj novaj instruaj metodoj ege interesas la esperantistojn.

Antaù la disiĝo, ni povis vidi ankaù projekcion de belegaj reklamaj kolorfilmoj en Esperanto, de la aùtomobil-Firmo Fiat.

Gratuloj al la organizintoj kaj al ĉiuj samideanoj, kiuj partoprenis la sukceson de tiu kultura tago, ĉefe dankon al F-ino Albault, F-ino Vierne, D-ro Albault, S-ro Lontaigne, S-ro Thomas, S-ro Loubic.

La raportanto - T. Cristofol.

( De el Tuluza Stelo )

Roneotypé par la Federation d'Esperanto Languedoc-Roussillon
DIRECTEUR de la Publication : Lucien ANGEVIN. 30 LE CAILAR.